

Christian Richardt,
Lulkanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Dormu, infaneto,
en cia lul-liteto!
Pelas for la muŝojn mi,
ke eksonĝu dolĉ ci;
dormu, infaneto!

En imago mia
korpet' prosperas cia,
el la brakoj de l' patrin'
vidas mi elkreski cin,
en imago mia.

Tion ne forgesu:
Memori ci ne ĉesu
pri l' patrina zorg' por ci;
preĝi cin instruis ŝi.
Tion ne forgesu!

Estu ci feliĉa!
Sed kiel roz' dorn-riĉa
viv' sen dornoj esta ne.
Prenas tiujn mi, por ke
estu ci feliĉa.

Kun ridet' vekiĝu,
birdete ci gajiĝu!
Mola nest' ŝirmanta cin
estas la patrin sin';
Kun ridet' vekiĝu!

*Traduko de la Dana poemo "Vuggevisse" de CHRISTIAN RICHARDT (*1831-05-25 – †1892-12-18) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1987-02.*

MR-201-2 / Arg-657-1320 (2012-11-17 19:29:02)

Mi, Manfred Retzlaff, tradukis tiun ĉi poemon en Februaro de la jaro 1987 laŭ la origina danalingva teksto.